

La Riverego

Aŭtuno de 1996

Esperanto-Societo Kebekia

N^o 44^o, Jaro 11^o

Invito al la Tria Aŭtuna Renkontiĝo Esperantista

Normand Fleury

La rencontre automnale de la S.Q.E., en collaboration avec des groupes espérantistes des États-Unis; aura lieu dans les montagnes du Vermont, lors de la fin de semaine de l'Action de Grâce. Inscrivez-vous au plus vite : un programme varié et des montagnes aux couleurs automnales vous y attendent.

Imagu : se la dua ARE estis plu sukcesa ol la unua, kia estos la tria ?

Ni kore invitas vin partopreni la trian ARE-n, kiu okazos de la 12^a ĝis la 14^a de oktobro 1996, en la Montara Gastejo OKEMO, Ludlow, Vermonto.

La kotizo duoniĝis : ĝi nun estas 15 USD (usonaj dolaroj), kaj nur 5 USD por studentoj, senlaboruloj kaj emeritoj. Infanoj ĝis la aĝo 16 partoprenas senpage.

Okemo estas belega loko kaj vi povas inviti ankaŭ viajn amikojn, parencojn veni por ripozi en la montara naturo.

Loĝprezoj ne estas inkluzivitaj : ili varias laŭ la grandeco de la loĝejoj. Tiuj ĉi inkluzivas plenekipitan kuirejon. Eblas dividi loĝejon aŭ ĉambron kun aliaj. Mi pretas kunigi homojn, kiuj kontaktos nin ĝis la **fino de septembro**. Kontakto min telefone aŭ fakse je (514) 495-8442, aŭ rete je normand.fleury@sympatico.ca. Pri la prezoj, petu informojn rekte de OKEMO (anglalingve) je 1-800-78-OKEMO. Se vi preferas dormi ĉe junulargastejo, vi mem mendu : Trojan Horse AYH-Hostel, 1-802-228-5244. Troviĝas

ankaŭ moteloj.

Se vi estas komencanto, venu lertiĝi. Se vi jam lertas, venu ĝui la etoson kaj amikecon de internacia renkontiĝo.

Jam anoncis sian partoprenon homoj el Ĉeĥio kaj Aŭstralio, krom tiuj el NovAnglio, NovJorkio, Ontario kaj Kebekio.

Zamenhof et la Légion d'honneur

On savait depuis toujours que Zamenhof avait été fait membre de la Légion d'honneur à l'occasion du premier congrès d'espéranto, tenu à Boulogne-sur-Mer (en France), en 1905. On a même des photos le montrant portant fièrement l'insigne de l'ordre, tout à côté de son étoile verte. Néanmoins, il a longtemps été impossible d'avoir du gouvernement français confirmation de cette nomination.

Finalement, M. Roberto Lloancy a réussi à vaincre l'inertie étatique. Dans sa requête, M. Lloancy ne mentionnait pas l'espéranto, de manière à ne pas éveiller de soupçons. Malgré cela,

aucune réponse. Il s'est alors plaint directement auprès du Président de la République, grand maître de l'ordre. Il a alors reçu une photocopie des documents désirés.

Zamenhof a reçu sa décoration le 29 juillet, jour de sa rencontre avec le ministre de l'Éducation, M. Jean-Baptiste Bienvenu-Martin. C'est cependant le ministre des Affaires étrangères et Premier Ministre, M. Maurice Rouvier, qui a proposé sa candidature. Cette décoration montre l'enthousiasme dont le monde faisait alors preuve à l'égard de l'espéranto. [D'après *Esperanto*, n^o 1082, juin 1996]

Pardonon

La Esperanto-Societo Kebekia pardonpetas al ĉiuj, kiuj estis fruege vokitaj — kaj vekitaj — de *la Papago* pasintan printempon. Temis pri tefnika problemo, kiu tuj estis korektita kaj ne plu okazas. Tiuj, kiuj tamen preferas ne plu esti telefone memorigitaj pri la monataj — kaj eble aliaj, ne antaŭviditaj — kunvenoj, povas lasi mesaĝon je 272-0151. Tiu numero ankaŭ validas por tiuj Montrealanoj, kiuj ankoraŭ ne estas vokataj sed ja ŝatus esti tiel memorigitaj.

La Société québécoise d'espéranto présente ses excuses à tous ceux et toutes celles qui, le printemps dernier, ont été appelés à des heures indues par l'ordinateur de *la Papago*. Il s'agissait d'un problème technique qui a aussitôt été corrigé. Cependant, ceux et celles qui ne désirent plus être informés par téléphone de l'imminence des rencontres mensuelles, ainsi que des rencontres imprévues, peuvent en tout temps laisser un message à cet effet au 272-0151. Ce numéro est aussi celui qu'on doit composer pour être mis sur la liste de ceux et celles que *la Papago* appelle (uniquement à Montréal).

Page web de la S.Q.E.

La Société québécoise d'espéranto a dorénavant son « site web », page d'informations accessible par le réseau internet. D'abord uniquement en espéranto, ce site prendra sans doute bientôt de l'ampleur. On peut l'atteindre à l'adresse suivante : <http://www.cam.org/~mmaerten/esk.html>

Ce site est une création de Marco Maertens, que les internautes peuvent contacter à l'adresse électronique : mmaerten@cam.org

Retour de manivelle

Le directeur de Radio Suisse Internationale qui avait fait éliminer l'espéranto de la liste des langues utilisées par cette station a été viré pour incompétence. RSI est au bord de la faillite dans un pays où la radio sur ondes courtes fut promue par un grand pionnier de l'espéranto : Edmond Privat. Les économies, c'est possible avec l'espéranto, pas contre lui. Ce ne sont pas les économies dérisoires sur le dos de l'espéranto qui pouvaient sauver RSI, et le capital de sympathie dont jouissait la Suisse et cette station dans de nombreux pays grâce à l'espéranto est maintenant détruit. [*SAT-Amikaro - Service de presse*, n° 512, juillet 1996]

Express

L'Express d'Outremont, journal hebdomadaire, consacrait ni plus ni moins qu'une chronique à l'espéranto, le 19 avril dernier. Sous le titre *Que lisent-ils ?* le journaliste Maxime Jacobs présentait rapidement la carrière et les idées de notre ami Michel Perreault, fondateur de l'institut Pantonal de recherches musicales (situé à Outremont, justement) et sympathisant de l'espéranto. Celui-ci propose aux lecteurs *Le défi des langues*, de Claude Piron, « livre [qui] l'a fasciné et [dont] il n'hésite pas à dire qu'il s'agit du meilleur bouquin traitant de la question ».

Le *Figaro littéraire* a consacré le 5 octobre dernier une page complète à l'espéranto, avec des textes au contenu objectif, basé sur les œuvres de Pierre Janton, Umberto Eco, Claude Hagège et d'autres linguistes. [D'après *Esperanto*, n° 1079, mars 1996]

Esperanto 110

Okaze de la 110-jariĝo de Esperanto, la Esperanto-Societo Kebekia organizos festan semajnfino en majo 1997, en Montrealo. Estas invito por ĉiuj Kebekiaj Esperantistoj, kaj ankaŭ por Otavanoj kaj aliaj najbaroj. Detaloj venos.

La Riverego (Le fleuve) est publié par la Société québécoise d'espéranto en mars, juin, septembre et décembre. Dépôts légaux : bibliothèques nationales du Canada et du Québec. Premier trimestre 1986. ISSN 0830-9574. Le contenu des articles est sous la responsabilité des auteurs. La reproduction des articles est permise, avec mention obligatoire de la source. Photocopie à 125 exemplaires sur papier recyclé. Gratuit pour les membres de la S.Q.E. Autrement, l'abonnement annuel est de 10 \$.

La Riverego estas eldonata de la Esperanto-Societo Kebekia en marto, junio, septembro kaj decembro. Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem. Oni rajtas kopii la artikolojn, kun nepra indiko de la fonto. Fotkopiita 125oble sur reuzpapero. Senpage por la membroj de E.S.K. Por aliaj, la jara abono kostas 10 CAD. UEA-kodo de la Societo : kebk-d.

Échéance pour le prochain numéro / limdato por la venonta numero : 1996.12.01.

Rédacteur / redaktis : Sylvain Auclair. Ont collaboré à ce numéro / kunlaboris al ĉi tiu numero : Suzanne Bolduc, Normand Fleury kaj Marco Maertens. Administrateurs de la S.Q.E. / estraranoj de E.S.K. : Normand Fleury (président / prezidanto), Sylvain Auclair (vice-président / vicprezidanto), Marco Maertens (secrétaire-trésorier / sekretario-kasisto), Jean-Claude Bélanger, Márta Dikman.

Esperanto-Societo Kebekia / Société québécoise d'espéranto

6358-A, rue de Bordeaux

Montréal Québec H2G 2R8

Répondeur / telefonrespondilo : (514) 272-0151

Por senti sin ano de Esperanto

Ian Fantom

Comment faire en sorte que même les débutants se sentent « membres de l'espéranto » au niveau mondial ? L'auteur propose ici une solution.

« **K** iam mi pagis mian kotizon al mia nacia Esperanto-organizaĵo », iam diris novbakita esperantisto al mi, « mi supozis min ano de Esperanto — sed tute ne : oni devas rekotizi al UEA, kaj al la loka klubo, kaj... » Mi klarigis al li ke Esperanto estas ne nur unu organizaĵo, sed tutmonda socio ; tute simple tiel ĝi evoluis. Tiu persono estas nun de longe aktiva laboranto por Esperanto je nacia kaj loka skaloj. Tamen, per tiu konversacio oni ekvidas iom la frustrigon de E-komencanto.

Alia komencanto diris al mi, ke li opinias la Esperantajn eldonaĵojn amatoraj. Li komparis la nacian bultenon kun la bele ilustritaj magazinoj sur la bretoj de ĉiu gazetvendisto. Nur poste mi konstatis ke li verŝajne eĉ ne vidis internaciajn magazinojn kiel *Esperanto*, *Monato*, *El Popola Ĉinio*. Lia perspektivo estis limigita al la loka aŭ nacia organizaĵo.

Kion ricevas homoj kiel li — granda plimulto de la monda esperantistaro — kontraŭ la kotizo pagita al nacia E-

**Por la unua fojo internaci-
skala agado forte impulsus
la antaŭenigon de
Esperanto je loka kaj nacia
niveletoj.**

organizaĵo ? Tio dependas de la lando. Tamen, ĝenerale temas pri nacia bulteno kiu ekhavas literaturon verkitan de samlingvanoj por samlingvanoj ; novaĵojn pri Esperanto, kutime en la loka lingvo ; helpilojn por komencantoj kaj progresantoj. Ĉu tio sufiĉas por doni al la ricevantoj tutmondan perspektivon ?

Legi artikolojn verkitajn de

samlingvano ŝajnas nur intelekta ludo, ne vere aŭtentika uzo de Esperanto. Novaĵoj lokaj kaj naciaj estas necesaj, se oni deziras agi por subteni Esperanton, sed ankaŭ ili ne kondukaj la leganton al aŭtentika uzo de la lingvo. Internaciaj novaĵoj helpas doni pli vastan perspektivon, sed se ili presiĝas en la loka lingvo, la leganto ne sentas ke li senpere atingas tiun vastan mondon. Lingva helpo ja estas utila por lernantoj, sed por kio ĝi preparas ilin ?

Tio similas al lerneja sistemo kiu edukas la lernantojn kun la supozo, ke ili iros al universitato, dum fakte malplimulto faros tion. Ni edukas niajn esperantistojn supozante ke ili aliĝos al internacia organizaĵo, dum la plimulto fakte restos anoj nur de la nacia asocio. Plue, ĝuste la periferiajn anojn — kiuj eble restos en la movado venontjare, eble ne — ni devas plej multe flegi.

Tio signifas ke ili devas senti sin « anoj de Esperanto » ekde la komenco, jam pro sia aneco en la landa E-asocio. Ili devas esti senpere en kontakto kun la mondo, uzante Esperanton, Necesas trovi solvon por tio, sen plialtigi la kotizojn.

La solvo estas principe simpla. Anstataŭ traduki la internaciajn novaĵojn en amason da naciaj lingvoj, oni eldonu unu profesi-nivele produktitan novaĵbultenon en Esperanto, verkitan en simpla lingvaĵo, kiun eĉ komencanto komprenus (aŭ bonvenigus kiel aktualan studmaterialon). Oni povus argumenti ke tion jam faras *Heroldo* kaj *Eventoj*, certagrade *Esperanto* ; sed kion oni bezonas estas io tre konciza, mallonga kaj malmultekosta. Ĝi ja ne konkurencus kun la menciitaj revuoj ; tute male, ĝi tenus la intereson de periferiaj esperantistoj, tiel ke pliaj el ili fariĝus esperantistoj kernaj, kiuj

abonas internaciajn revuojn kaj aliĝas al tutmondaj organizaĵoj. La nova bulteno povus esti pogrande sendata de la eldonanto al la naciaj asocioj, kiuj distribuus ĝin aldone al siaj kutimaj ekspedaĵoj.

Laŭ la Jarlibro de UEA, la suma

**Ili devas esti senpere en
kontakto kun la mondo,
uzante Esperanton.**

membronombro de ĉiuj landaj asocioj estas iom pli ol 27 000. Aldono de 5 577 kolektivaj anoj donas rondciferan sumon de 33 000. Tia eldonkvanto estus trarompo en la Esperanto eldonado.

Kia devus esti tiu bulteno ? Sur bona papero, ĝi ampleksus 2 aŭ 4 paĝojn, kaj aperus monate aŭ dumonate. Ĝi estu plenpakita per internaciaj novaĵoj movadaj kaj per faktoj. Verkita en simpla lingvaĵo, ĝi interesu kaj lernanton kaj spertulon. La redakcio devas esti loko tra kiu jam fluas multaj E-novaĵoj ; evidentaj kandidatoj estas la redaktejoj de *Esperanto*, *Heroldo* kaj *Eventoj*. La agadon povus preni sur sin UEA, aŭ komerca entrepreno ekster ĝi. En ambaŭ kazoj UEA ludus gravan rolon en la merkato, ĉefe en la influado de la landaj asocioj.

Eldonkvanto de 33 000 estas respektinde granda. Oni verŝajne povus altiri reklamojn de internaciaj kompanioj, kio donus monon kaj prestiĝon. Por la unua fojo internaci-skala agado forte impulsus la antaŭenigon de Esperanto je loka kaj nacia niveloj. Mi proponas kiel nomon por la nova eldonaĵo : *Esperanto Hodiaŭ*. Kiu deziras alpreni la ideon ? [*El Esperanto*, n^o 1083, jul.-aŭg. 1996]

Manifeste

Régulièrement, des espérantistes sentent la nécessité d'exprimer la raison d'être de leur engagement. Sous forme de manifestes, dont la teneur varie avec les années et les signataires. Le dernier en date a été rédigé lors du dernier congrès

Nous, membres du mouvement mondial pour la promotion de la langue internationale espéranto, adressons ce manifeste à tous les gouvernements, à toutes les organisations internationales et à tous les hommes de bonne volonté ;

déclarons notre ferme intention de poursuivre notre action pour atteindre les objectifs ci-dessous exprimés ;

et invitons chacune des organisations et chacune des personnes à se joindre à nos efforts en ce sens.

L'espéranto, lancé en 1887 comme projet de langue auxiliaire internationale, s'est rapidement développé pour devenir une langue vivante, riche en nuances. Depuis plus d'un siècle, l'espéranto fonctionne comme moyen de relier les hommes à travers les barrières linguistiques et culturelles, et les objectifs de ses utilisateurs n'ont rien perdu de leur importance et de leur actualité. Ni l'utilisation mondiale de quelques langues nationales, ni les avancées en matière de techniques de communication, ni même l'invention de nouvelles méthodes d'enseignement des langues n'aident à la réalisation d'un ordre linguistique juste et efficace, basé sur les principes suivants que nous considérons comme essentiels.

1. Démocratie. Un système de communication qui privilégie toujours certains citoyens, mais exige d'autres qu'ils investissent des années d'efforts pour atteindre un degré moindre de compétence, est fondamentalement antidémocratique. Bien que l'espéranto, comme toute autre langue, ne

soit pas parfait, il dépasse de loin tous ses rivaux dans le cadre d'une communication égalitaire à l'échelle mondiale. Nous affirmons que l'inégalité linguistique entraîne une inégalité de communication à tous les niveaux, y compris au niveau international. Nous sommes un mouvement pour une communication démocratique.

2. Éducation transnationale.

Toutes les langues ethniques sont liées à des cultures et des nations. Par

Nous affirmons que
l'usage exclusif des
langues nationales pose
inévitablement des limites
aux libertés d'expression,
de communication et
d'association. Nous
sommes un mouvement
pour l'émancipation
humaine.

exemple, l'élève qui étudie l'anglais découvre aussi la culture, la géographie et les systèmes politiques des pays anglophones, principalement des États-Unis d'Amérique du Nord ainsi que du Royaume-Uni de Grande-Bretagne et d'Irlande-du-Nord. L'élève qui étudie l'espéranto découvre un monde sans frontières où il se sent chez lui dans chaque pays. Nous affirmons que l'éducation par une langue ethnique, quelle qu'elle soit, est liée à une certaine vision du monde. Nous sommes un mouvement pour une

éducation transnationale.

3. Efficacité pédagogique. Seul un faible pourcentage de ceux qui étudient une langue étrangère la maîtrisent vraiment. En espéranto, l'acquisition complète est possible, même en autodidacte. Diverses études ont montré que l'espéranto est utile comme préparation à l'apprentissage d'autres langues. Il a aussi été recommandé dans des cours comme élément essentiel permettant aux élèves de prendre plus facilement conscience de ce qu'est une langue. Nous affirmons que la difficulté des langues ethniques présentera toujours un obstacle pour de nombreux élèves qui tireraient cependant profit de la connaissance d'une deuxième langue. Nous sommes un mouvement pour un enseignement efficace des langues.

4. Plurilinguisme. La communauté espérantophone est quasiment la seule communauté linguistique au monde dont tous les membres sont, sans exception, bilingues ou plurilingues. Chacun a fait l'effort d'apprendre au moins une langue étrangère jusqu'à un niveau suffisant de compétence. Dans de nombreux cas, cela a conduit à la connaissance et à l'amour de plusieurs langues, et en général, à l'élargissement de l'horizon personnel. Nous affirmons que les utilisateurs de toutes les langues — celles qui sont largement diffusées et celles qui le sont moins — devraient disposer d'une réelle possibilité de s'approprier une deuxième langue et d'y atteindre un niveau de communication suffisamment élevé. Nous sommes un

de Prague

mondial, tenu cet été à Prague. Le voici, en version française. Son titre entier : *Manifeste de Prague du mouvement pour la langue internationale espéranto.*

mouvement pour apporter à tous cette possibilité qu'est le bilinguisme.

5. Droits linguistiques. La disparité de pouvoir entre les langues est de nature à produire une constante insécurité linguistique, voire même l'oppression directe par la langue pour une grande partie de la population mondiale. Dans la communauté espérantophone, les personnes, que leur langue maternelle soit largement diffusée ou non, qu'elle soit officielle ou non, se retrouvent sur un terrain neutre grâce à la volonté réciproque de réaliser le compromis. Un tel équilibre entre les droits linguistiques et les responsabilités crée un précédent pour développer et évaluer d'autres solutions à l'inégalité et aux conflits linguistiques. Nous affirmons que les disparités importantes de pouvoir entre les langues minent les garanties — exprimées dans tant de documents internationaux — de traitement égal, sans discrimination par la langue. Nous sommes un mouvement pour les droits linguistiques.

6. Diversité linguistique. Les gouvernements nationaux tendent à traiter la grande diversité des langues dans le monde comme un obstacle à la communication et au progrès. Néanmoins, dans la communauté espérantophone, la diversité linguistique est vécue comme une source permanente et indispensable d'enrichissement. Par suite, chaque langue, comme toute espèce vivante, est porteuse de valeur et donc digne de protection et de soutien. Nous affirmons que les politiques de

communication et de développement, si elles ne sont pas basées sur le respect et le soutien de toutes les langues, condamnent à mort la majorité des langues du monde. Nous sommes un mouvement pour la diversité linguistique.

7. Émancipation humaine. Chaque langue donne à la fois une liberté et des limites à ses usagers, en leur permettant de se parler entre eux, mais les empêchant de communiquer avec d'autres. Élaboré comme un moyen de communication universellement accessible, l'espéranto est un des grands projets d'émancipation

humaine qui fonctionnent — un de ceux qui permettent à chaque citoyen de participer, individuellement et pleinement, à la communauté humaine, tout en étant profondément enraciné dans son identité culturelle et linguistique propre, mais non limité par celle-ci. Nous affirmons que l'usage exclusif des langues nationales pose inévitablement des limites aux libertés d'expression, de communication et d'association. Nous sommes un mouvement pour l'émancipation humaine.

Ce texte sera bientôt accessible sous forme de tiré à part auprès de la Société québécoise d'espéranto.

Vilma Sindona Eichholz

Ken Price

SinJORINO Eichholz mortis pace dum dormo, jaŭdon 13^{an} de julio 1995. Postvivas ŝin ŝia edzo Rŭdiger, kaj du filinoj, Suna kaj Brila.

Vilma naskiĝis en Germanio, kaj denaske parolis la germanan. Ŝi edziniĝis al Rŭdiger Eichholz, kaj ili migris al Kanado.

Mi unufoje renkontis ilin dum pikniko de esperantistoj en Toronto antaŭ 38 jaroj. Impresis min ilia flua kaj vigla babilado en Esperanto. En la fruaj 60^{aj} jaroj vizitantoj al ilia Esperanto-Domo en Oakville estis ĉarmitaj kiam la junaj infanoj parolis kun ili en Esperanto.

Vilma aktive propagandis Esperanton ĉie, speciale inter mondfederalistoj kaj anoj de la tiam tre rapide kreskanta nova organizaĵo *Voĉo de Virinoj*. Rezulte de ŝia agado, grupoj en kelkaj urboj eklernis Esperanton.

Vilma mem instruis klasojn en sia hejmo kaj aliloke. Ŝia vigla entuziasma instruado allogis al nia movado kelkajn el la klasanoj, kiuj fariĝis tre valoraj membroj

de nia movado. Pro ŝia deziro ne nur instrui Esperanton, sed samtempe eduki (speciale gejunulojn) al pli bona civitaneco — aŭ pli ĝuste, mondaneco — ŝi verkis kaj uzis proprajn kursmaterialojn. En 1983 Vilma iris al Ĉinio kaj instruis tie dum unu jaro.

En la fino de la pasinta somero (1994), Vilma spertis daŭran lacecon, kaj kuracisto diagnozis kanceron. Dum monatoj Vilma kuraĝe daŭrigis la batalon hejme, subtenana de sia edzo.

Kiam mi lastfoje parolis kun ŝi, la 13^{an} de aprilo (1995), ŝi diris ke « morto venos post nur semajnoj, sed oni ne bedaŭru min, ĉar mi ne bedaŭras min mem ». Moviĝado kaŭzis doloron, kaj ŝi devis gluti pilolojn ĉiun kvaran horon, tage kaj nokte. Malgraŭ tio, ŝi uzis la vekajn horojn por daŭrigi la verkadon de libroj en la germana kaj en Esperanto. Ĝis la fino ŝi uzis sian energion klopodante helpi la junulojn de la mondo vivi pli feliĉe kaj harmonie. Ŝi meritas la mezan nomon. [*El Alumeto*, n^o 10/11, somero / aŭtuno 1995]

Paroli suke

Gonçalo Neves

Bref historique de l'espéranto oral, puis dix conseils pour améliorer son discours oral, le rendre plus vivant, plus savoureux.

Kiam fakte naskiĝis la parolata Esperanto? Laŭ la tradicio, la unua interparolo komunuma nialingve okazis en Varsovio, en 1888, inter Zamenhof kaj la pola pioniro Grabowski. Kaj kiunivela ĝi estis? Oni povas apenaŭ imagi. Unuflanke Zamenhof, la Kreinto, la iniciatoro, esplorinta ĉiujn angulojn de la lingvo, sed neniam ĝin parolinta kun alia homo; aliflanke Grabowski, poligloto, eksvolapükisto, studinta la lingvon je elementa nivelo, fakte je la nivelo de la unua libro.

La jaro 1905 markas turno-punkton en la buŝ-evoluo de Esperanto. Tiam ja okazis en Francio la unua Universala Kongreso, tiam la adeptoj ja ekhavis la okazon unuafoje aŭskulti kaj parole uzi la lingvon. Pri la nivelo oni povas nur konjekti. Por la kongreso oni elektis prezidanton — kompreneble, Zamenhof — kaj kvin vicprezidantojn el kiuj nur unu iom scipovis Esperanton. Krome oni starigis Lingvan Komitaton, kien oni alektis 99 anojn. Nu, el tiuj komitatoj nur 20 kapablis kontentige paroli la lingvon,

**Laste sed ne
balaste, legu!
Legu abunde kaj
redunde!**

kaj eble nur 3 aŭ 4 povus serioze gvidi ĝian evoluon. Laŭdire tie troveblis ankaŭ birdoj, kiuj ne sciis skribi eĉ tri liniojn en korekta Esperanto.

Aliaj tempoj, aliaj moroj. Nia lingvo evoluis dum tuta jarcento, skribe kaj parole. Tamen oni povas facile konstati ke multaj homoj parolas Esperanton iom magre kaj sensuke, ne pro talento-manko, sed ĉefe tial ke ili

emas sekvi la vortumojn kaj spiriton de sia nacia lingvo. La sekvan konsilaron mi adapte ĉerpis el kelkaj aŭtoroj meditintaj pri tiu problemo, kaj ankaŭ el miaj propraj spertoj kaj rezonoj.

Jen do kvazaŭa dekalogo:

1.— Ne parolu komplike, do ne pensu komplike. Paroli suke ne signifas paroli baroke. Ne imitu la burleskan figuron kreitan de Georgo Kamaĉo! Se vi volas diri *taksio*, ne diru *taksimetra veturilo*; la spegulon de via necesejo ne nomu *tualeteja reflektilo*; se vi intencas veturi metroe kun amiko, sufiĉas demandi: *Kien ni metrou?* anstataŭ tordi la langon: *Al kie ni projektu metropoliteni?*

2.— Ne traduku proverbojn kaj idiotismojn el via lingvo! Nenio pli teda ol rondo de divers-nacianoj, kiam ĉiuj decidas laŭvorte esperantigi plej fremdajn parol-turnojn kaj diraĵojn. Uzu la zamenhofan proverbaron, kie abundas apenaŭ ekspluatataj trezoroj. Unu paĝo da Proverbaro instruas pli ol dek prelegoj, ĉefe se temas pri la miaj.

3.— Ne trouzu la adjektivajn participojn, kaj la aktivajn kaj la pasivajn, kiam ili ne vere necesas. Se vi volas diri *Ni trovos multajn obstaklojn*, ne diru *Estas trovotaj multaj obstakloj*. Kaj ne forgesu ke, anstataŭ diri: *Se mi estus farinta*, vi povas diri, pli rapide kaj samklare, *Se mi farintus*. Anstataŭ *La libro estis aĉetita, legita kaj disvastigita tra la tuta lando*, oni povas diri: *La libron oni aĉetis, legis kaj disvastigis tra la tuta lando*. Ĉi lasta rimedo evitigas ankaŭ la ripetadon de la verbo *esti*, kiun cetere indas ripozigi de tempo al tempo, ĉar alternativoj feliĉe ne mankas: resti, kuŝi, stari, sidi, situi, ekzisti, stati, troviĝi, aŭ eĉ, laŭ la kunteksto, eci.

4.— Vi povas atingi belan efekton dekreĉante la sufiksojn disde la vortoj.

Rimarku ekz. la diferencon inter *Li paliĝis, senmoviĝis, silentiĝis* kaj la jena *Li iĝis pala, senmova, silenta*.

5.— Uzu ĉiujn pov-eblojn de nia lingvo. Ne nur la praesperantaĵojn *Jam temp' está*, aŭ *Kadó, kadó!* sed eĉ plej sukajn modernajn esprimojn: *sat'!*

**Unu paĝo da
Proverbaro instruas
pli ol dek prelegoj,
ĉefe se temas
pri la miaj.**

sat' pri tio!, *eks' pri tio!*, *ek!* Kaj ne forgesu ke, anstataŭ diri *rapide!*, oni povas uzi la zamenhofan *rap! rap!*

6.— Ne forgesu ke la akuzativo ebligas liberan vort-ordon. Ekspluatu tiun liberon! Alŝovu la plej gravajn direndojn ĝis la komenco aŭ la fino de la frazo. Ekz.: **Lingvojn oni lernu prefere infanaĝe.**

7.— Kaj la verboj? Konatiĝu kun la u-formo! Ĝi ŝparos al vi vortojn kaj balastojn. Viaj frazoj iĝos pli elegantaj kaj elastaj. Ekz.: anstataŭ *Ĉu vi volas ke mi helpu vin?*, sufiĉas diri *Ĉu mi helpu vin?* Anstataŭ la monstra *Malpermesate fumi ĉi tie!*, eblas vortumi en pura Esperanto: *Ne fumu ĉi tie!*

8.— Mi ĵus diris *vortumi*. Jen mirinda sufikso, kies potencialon oni apenaŭ ekspluatas. Prezentu al vi jenon. Via filo prenas skribilon kaj fuŝ-desegnas sur la muro de via ĉambro. Kion li faras? Li skribumas la muron. Same buboj vomumas ka kuirejan plankon kaj pisumas tapiŝojn, sed tamen oni ne kapablas riproĉi, ni ilin eltenas kaj kisumas la vangojn, la

sekvo...

Lisez ceci, aussi !

Bertil Wennergren

Le mot *ankaŭ* signifie, qu'une chose n'est pas seule, qu'elle s'ajoute à d'autres déjà mentionnés. Dans les exemples suivants, on a mis en gras ce à quoi *ankaŭ* se rapporte.

Ankaŭ Petro ludas gitaron. Ankaŭ ŝi estas nomata Amalio, kiel vi, afabla fraŭlino. (La Rabistoj, p. 106). *Se vi prenis la violonon, prenu ankaŭ la arĉon.* (Proverbaro Esperantista, n° 2305). *Ankaŭ al vi, mia kara Hermano, li sentigos sian skurĝon.* (La Rabistoj, p. 41). *Mi petas vin ankaŭ poste prunti al mi.* (Fundamenta Ekzercaro, n° 14). *Ankaŭ hodiaŭ mi ne ricevis ankoraŭ lecionojn.* (Marta, p. 19). *La reĝo [...] eĉ ne permesis alporti al li manĝaĵon ; kaj ankaŭ dormi li ne povis.* (Biblio, Daniel chapitre 6). *Li tre bele ludas violonon, kaj li ankaŭ kantas bele.*

...Paroli suke

frunton.

9.— Uzu participojn en adverba formo, kaj aktive kaj pasive. Anstataŭ *Post kiam mi ricevis monon, mi aĉetis komputilon*, oni diru, pli elegante kaj koncize : *Ricevinte monon, mi aĉetis komputilon*. Komparu jenajn frazojn : *Mi rezignis, ĉar oni min atakis de ĉiuj flankoj kaj Atakate de ĉiuj flankoj, mi rezignis.*

10.— Laste sed ne balaste, legu ! Legu abunde kaj redunde ! Elektu precipe verkojn de talentaj aŭtoroj, freŝaj, sukaj kaj trafaj, lertaj manipuli la dialogan lingvon. Jen kelkaj ekzemploj : *Kiel akvo de l' rivero* de Raymond Schwartz, *Klaĉejo* de Karolo Piĉ, *Don Kiĥoto*, tradukita de Fernando de Diego, *Sed nur fragmento*, de Trevor Steele, *La verda raketo*, de Jean Forge, i.m.a.

[*El Kuspe*, oficiala informilo de Eŭska Esperanto-Asocio, n° 12, aŭtuno 1995. Ampleksa resumo de prelego eldirita okaze de la XV^a Renkontiĝo de Portugalaj Esperantistoj kaj publikigita en *Nia Bulteno*, organo de Portugalaj Esperanto-Asocio, n° 65.]

Où mettre ankaŭ

On entend très souvent dire, qu'il faut mettre *ankaŭ* tout de suite avant ce à quoi il se rapporte. Il s'agit d'une très bonne règle pour la clarté du style, mais elle n'est pas du tout obligatoire, contrairement à ce que l'on pense souvent. Dans le *Fundamento*, chez Zamenhof, et encore aujourd'hui chez plusieurs auteurs, *ankaŭ* peut être mis après ce qu'il souligne. Zamenhof a le plus souvent fait ainsi quand *ankaŭ* se rapportait à un pronom personnel, mais aussi dans d'autres cas.

Ili ankaŭ estas en la ĝardeno. (Fundamenta Ekzercaro, n° 16). *Sinjoro Petro kaj lia edzino tre amas miajn infanojn ; mi ankaŭ tre amas iliajn.* (Fundamenta Ekzercaro n° 18). *Ĉiu sin enmiksas, ĉiu volas montri, ke li ankaŭ estas saĝa homo.* (La Revizoro, p. 10).

Ankaŭ et les mots en ki-

Quand *ankaŭ* se rapporte à un mot en ki-, la règle veut même qu'*ankaŭ* suive ce mot. Les mots en ki- veulent en effet commencer leur proposition. On ne dit pas : *Ankaŭ kiu volas kunludi ?* *Ei amas virinon, ankaŭ kiu amas lin.* On doit dire plutôt : *Kiu ankaŭ volas kunludi ?* *Li amas virinon, kiu ankaŭ amas lin.*

Seul le contexte peut indiquer avec certitude, ce à quoi *ankaŭ* se rattache.

Accentuation

À l'oral, bien que l'accentuation ne suive pas des règles strictes et dépende des préférences personnelles, on observe la norme suivante : quand *ankaŭ* précède le mot auquel il se rapporte, c'est se mot qui porte un accent de phrase ; quand *ankaŭ* suit ce mot, c'est *ankaŭ* qui est souligné. *Ankaŭ mi amas vin. Mi ankaŭ amas vin.* [Traduit de *Tejo-tutmonde*, n° 3/73, juil.-sept. 1996]

Parler avec les enfants du monde

De retour d'un séjour en Bosnie, notre amie Nicole Rizzoni, de Morlaix, est revenue la tête pleine du souvenir de moments inoubliables, d'idées et de projets.

À Sarajevo, elle a été reçue par Mustafa qui, durant le siège, a présenté les émissions en espéranto de Radio Sarajevo puis, pendant que ceux qui s'étaient moqués de « Nicole Espéranto » sont restés à roupiller dans le car à cause de la barrière des langues, elle a été guidée dans Sarajevo par Salih, en espéranto. Toujours grâce à l'espéranto, le contact est établi aussi avec Gorazde, but d'un autre voyage. Sur le chemin du retour, entre Milan et Turin, Nicole a vu sur des grands murs, en énormes caractères, l'inscription « Espéranto langue de l'an 2000 ». Même remarque d'ailleurs de Bernard Schneider, responsable des éditions et du Service Librairie de SAT-Amikaro alors qu'il revenait de Venise.

Il y a aussi le souvenir d'un stand d'espéranto où des enfants et leurs parents ont été ravis de découvrir une langue dans laquelle il est possible d'apprendre à compter jusqu'à un million en 10 minutes et à conjuguer en 15 minutes. Il sont restés pendant deux heures pour en savoir plus puis sont revenus plus tard et ont demandé entre autres : Comment parler avec les enfants du monde ? [*SAT-Amikaro - Service de presse*, n° 512, juillet 1996]

Kalendaro de venontaj okazaĵoj

12^a ĝis 14^a de oktobro : Ludlow (Vermonto, Usono).

Aŭtuna Renkontiĝo.

1^a de novembro : Montreala Esperanto-Domo, 19 h 30.

Konversacia rondo. 20 h : temlando : **Meksikio.** Ni invitas vin prepari ion.

1^a ĝis 3^a de novembro : La Chaux-de-Fonds (Svislando).

Dua Internacia **Kolokvo pri Interlingvistiko.**

14^a de decembro: Montreala Esperanto-Domo, 18 h.

Zamenhofa festo. Komuna manĝo.

27^a de decembro ĝis 3^a de **januaro 1997.** Internacia Seminario de Germana Esperantista Junularo, en Freiburg, suda Germanio.

Ni plezure respondos demandojn pri la supraj (kaj aliaj) okazaĵoj : (514) 272-0151.

La mort d'une langue inventée

André Grabot

Dans la vie courante, Makhsoud Shafigi s'exprime en kazakh, car sa langue maternelle ne lui serait pas d'un grand secours pour communiquer : il est le dernier être au monde à parler le tchagataï, langue de cour des anciens Mongols, quand Gengis Khan régnait au XIII^e siècle sur toute l'Asie centrale.

« Je suis comme un monument historique digne de l'UNESCO, mais si je parle tchagataï, c'est un éternel monologue », ironise-t-il, ses yeux bridés enflammés par la fierté. Makhsoud appartient à l'ethnie kazakhe. Né en 1934 au Xinjiang, il a fui en 1964 la Chine où la Révolution culturelle s'amorçait.

Établi à Almaty, capitale du Kazakhstan, il a vécu de petits emplois agricoles dans les kolkhozes, délaissant pendant 22 ans la carrière de linguiste qui l'avait conduit dans les années cinquante à Pékin, où il a également étudié le mandarin et l'arabe.

La connaissance écrite et orale de l'arabe lui a permis de préserver son tchagataï, car cette langue d'origine turque et kazakh-mongole s'écrivait en alphabet arabe. Pour le malheur de Makhsoud, aujourd'hui âgé de 62 ans, « il n'y a pas eu de peuple tchagataï », raconte-t-il.

Gengis le Mongol avait confié la gestion de l'Asie centrale à Tchagataï, son fils cadet, qui imposa à cette région islamisée un idiome truffé de mots persans et arabes comme moyen de communication pour cimenter l'empire constitué de peuples très différents.

Ce fut la langue de la cour et des lettres, comme le persan l'était en Afghanistan. « Pendant plusieurs siècles, grâce au tchagataï, les nationalités régionales ont pu se pénétrer de la culture du Moyen-Orient », estime Seït Khousaïnov, linguiste kazakh, qui confirme que Makhsoud Shafigi est bien l'ultime locuteur du tchagataï.

Jusqu'à la fin du XIX^e siècle, avant la mainmise des Hans sur l'ensemble du territoire de la Chine actuelle et des Russes sur le Turkestan occidental, le tchagataï eut sa place chez les tribus nomades d'Asie centrale à côté du tatar, de l'ouzbek, du kirghize, du mongol et du kazakh. Devant les brimades linguistiques du maoïsme et l'usage systématique de l'alphabet cyrillique en U.R.S.S., le tchagataï s'est perdu au profit des langues locales et surtout du russe.

Sentant que le temps presse, Makhsoud a entrepris la rédaction d'un dictionnaire kazakh-tchagataï. Ce lexique de la dernière chance devrait lui permettre de faire découvrir des textes d'écrivains du Moyen Age tombés dans l'oubli, ce que Makhsoud qualifie de « grimaces linguistiques de l'histoire », en sirotant un dernier bol de thé vert dans son petit appartement de la banlieue d'Almaty. [Agence France Presse. *Le Devoir*, 10 septembre 1996]

Ek al NOREK

Ciprian Jauca

On se réunit aussi sur la côte du Pacifique ! L'auteur est par la suite devenu président de l'Association canadienne d'espéranto.

Mi havis la privilegion partopreni la 8^{am} NOREK (Nord-Okcident-Regionan Esperanto-Kunvenon), kiu okazis en Langley (BC) de la 18^a ĝis la 20^a de aŭgusto 1995. Kvankam nur 26 aŭ 27 esperantistoj entute partoprenis, kaj ili alvenis el diversaj urboj de Brita Kolumbio, Vaŝingtonio, Kalifornio, ŝajne eĉ Oregono, la etoso estis tiom « esperantista » ke mi sentis min « revivigita ».

La programo mem estis vere distra, kun multe da kantado, dancado, humuraĵoj, ktp (prejparte en esperanto !). Ĉiuj multege praktikis la internacian lingvon. Oni prelegis pri komputiloj ; laŭtelegis poemon tradukitan en Esperanton kaj fragmenton de la belega « E-mitologio » ; parolis pri la ĵusa Tamperea UK ; aŭkciis diversajn esperantaĵojn ; lernis kaj praktikis skŭamiŝ-an amikecandancon ; kaj ekskursis al la varmakvaj banejoj en Harrison, kie kelkaj ĝuegis banadon dum aliaj promenadis en la urbeto. La lastan tagon, spontane prezentiĝis teatraĵo, kiun ĉiuj ĝuis. Kaj ĉio ĉi okazis inter vendreda vespero kaj dimanĉa tagmezo. La organizintoj de tiu NOREK, Olga kaj Wally du Temple, sendube gratulendas.

Nun, memkompreneble mi ne estus honesta, se mi ne menciis ankaŭ tion kio pli-malpli ĝenis min : ĝenerale tre malmultaj gejunuloj partoprenis, kaj laŭ mia sperto tio estas forta, malgaja kaj malbonaŭgura indiko pri nia regiona movado ; due, ŝajnis al mi ke ne multaj partoprenantoj (atentu la eŭfemismon !) estis novaj esperantistoj, kio, aldonite al la antaŭa kritiko, aŭguras la estingiĝon de nia movado ; laste sed ne balaste mi konstatis ke ĉi-renkontiĝo enhavis nenian organizitan agon kun la celo propagandi Esperanton, kvankam okazoj kaj eĉ interesitoj laŭ mia opinio abundis. Bedaŭrinde mi ankaŭ konstatis ke la fervora(j) propagandisto(j) plej ofte disdonis malklarajn kaj fojfoje eĉ falsajn informojn pri nia lingvo kaj / aŭ movado. [*El Alumeto*, n^o 10/11, somero/aŭtuno 1995]